

Kunvokilo al Jarkunveno

la 30an de junio 2013 en kastelo Grésillon, je la 9a30

La jarkunveno por la jaro 2012 okazos dimanĉon, la 30an de junio 2013.

La societanoj estas invititaj en la kastelo ekde vendredo vespere, nia kuiristoj Ronan kaj Sunjo zorgos pri la manĝo vendredon vespere, la matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo sabaton, la matenmanĝo kaj tagmanĝo dimanĉon. Koncerne la vendredan vespermanĝon, ni organizos ĝin por minimume 6 sin anoncintaj personoj: la limdato por mendi tiun ĉi manĝon estas la 20an de junio.

Ni proponos al la societanoj gvidatan viziton de la bieno, sabaton matene, kaj sabaton posttagmeze Xavier Godivier gvidos laborsesion en grupoj pri la jenaj temoj: la nunaj kaj estontaj konstrulaboroj, la evoluo de malfermo al nova klientaro, la evoluo de la societano (sociaj partoj B, eksigo), kiun administradon ni adoptu por 2014 kaj la sekvantaj jaroj?

La societanoj, kiuj ne povos mem veni, bonvolu sendi rajtigilon plenigitan per la nomo de societano ĉeestonta la jarkunvenon, kontaktante tiun ĉi por obei la novan statutan regulon, kiu limigas la nombron da rajtigoj je 5 por ĉiu ĉeestanta persono (vi povas konsulti la liston de la societanoj, kiuj anoncis sian ĉeeston, en la retejo "gresillon.org", rubriko "Asembleo": <http://gresillon.org/kunveno>; NB: kaze de ne plenigita rajtigilo, tiu ĉi ne estos uzebla dum la voĉdonoj, sed estos enkalkulita por kontrolado de la kvorumo je 1/6 de la societanoj - t.e. 86 -, necesa por ke la jarkunveno validu).

Tagordo

De la 8a30 ĝis la 9a30:

subskribado de la listo de ĉeestantoj (ĉiu subskribu por si kaj por siaj anstataŭatoj), apud la eniro de salono Zamenhof

Je la 9a30: malfermo de la Jarkunveno en la salono Zamenhof

- 1) elekto de kunsidaj prezidanto kaj sekretario
- 2) nombrado de ĉeestantoj kaj rajtigoj
- 3) evoluo de la nombro de societanoj, kontrolado de la kvorumo
- 4) agadraporto 2012: pridiskuto kaj voĉdono (dum la kunsido mem)
- 5) financa raporto 2012: pridiskuto kaj voĉdono (dum la kunsido mem)
- 6) antaŭvidita buĝeto 2013
- 7) rezolucio koncerne Elizabeth Dubot
- 8) rezolucio koncerne Pierre Soubourou
- 9) rezolucio koncerne la lukontrakton de la estonta Verda Vojo
- 10) rezolucio koncerne la kunvokon al jarkunveno pere de retmesaĝoj
- 11) diversaj

Evoluo de la nombro de societanoj

Nuntempe, ni havas 420 aktivajn aŭ silentajn societanojn: inter ili estas 15 asocioj, 78 eksterlandanoj kaj 92 personoj neaktivaj de tri jaroj. Al tiuj ĉi 420 aldoniĝas 96 societanoj, kiujn ni ne plu povas kontakti (pro ne valida adreso) de 3 ĝis 20 jaroj. Depost la jarkunveno 2010 ĝis hodiaŭ, okazis 150 ŝanĝoj, t.e. 54 forpaso, 53 donacoj, 7 ne plu kontakteblaj societanoj, 25 novaj societanoj kaj 2 aĉetoj de kromaj societaj partoj.

Agadraporto 2012

Tiu ĉi jaro 2012 estas finance malfacila jaro, ĉar la enspezoj devenas nur de restadoj organizitaj de la Kulturdomo mem kaj la elspezoj estis pli altaj ol en 2011. Ni malfermis la kastelon al luado de ne-societanoj nur en aprilo 2013, post apero de anonco en la reto en novembro 2012.

Agadoj 2012

- La dua « printempa semajno » okazis de la 13a ĝis la 21a de aprilo 2012, organizita kunlabore kun ILEI. Zsafia Korody kaj Christophe Chazarein trejnigis 27 « lernantojn » (en 2011, 25 lernantojn) por KER-ekzamenoj, respektive niveloj B2 aŭ C1 kaj nivelo B1. Fine de la semajno, 6 kromaj homoj (en 2011, 8 homoj) venis al la kastelo por trapasi ekzamenojn. La ekzamenantaro konsistis el Zsafia Korody kaj François Lo Jacomo.
- Jannick Huet estis staĝestro, Sunjo Cash kaj Ronan Le Corre zorgis pri mastrumado kaj kuirado.
- Ĵus antaŭ la printempa semajno, Mireille Grosjean (Svislando) kaj Miguel Gonzalès (Kubo) gvidis seminarion, kiun partoprenis preskaŭ ĉiuj staĝanoj de la printempa semajno.

- Ni festis 60-jariĝon de Greziljono la 29an kaj 30an de junio, antaŭ nia jarkunveno okazinta la 1an de julio 2012.
- La somera programo konsistis el

S1 : « art-amatora semajno » de la 21a ĝis la 28a de julio, partoprenita de 14 staĝanoj (21 staĝanoj en 2011)

S2 : « alternativa semajno » de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto, partoprenita de 25 staĝanoj (16 staĝanoj en 2011)

S3 : « turisma semano » de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto, partoprenita de 22 staĝanoj (19 staĝanoj en 2011)

S4 : « pupteatra festivalo » de la 11a ĝis la 20a de aŭgusto, partoprenita de 29 staĝanoj (22 staĝanoj en 2011).

Entute 90 staĝanoj en 2012 (78 staĝanoj en 2011)

- Ni dungis Sunjo Cash kaj Ronan le Corre por mastrumado kaj kuirado dum la 4 semajnoj. Krome, deĵoris dum tiuj ĉi 4 semajnoj: staĝestroj Xavier Godivier, Pierre Soubourou, Louis Jeuland, Jannick Huet kaj Bert Schumann, instruantoj kaj animantoj Nina Korĵenenskaja, Jean-Luc Kristos, Manandhar Rajendra, kiu venis el Nepalo duone por ni, duone por la renkontiĝo en Pluezek, Lucia Unia (kurso pri franca lingvo), Caroline Mauboussin, Jacqueline Lepeix, Nicky Janssen (Belgio), Christoph kaj Inès Franck (Germanio) kaj Jean-Pierre Poulin.
- La unua aŭtuna semajno AŬTUNE okazis inter la 27a de oktobro kaj la 3a de novembro 2012, organizita de Bert Schumann, kun kursoj pri Esperanto kaj muziko de Svetlana Smétanina el Moskvo, Maja Mériaux kaj Ansofi Markov. Ĝin partoprenis 18 staĝanoj.
- La Jarfinan FESTegon, inter la 28.12 kaj la 02.01.2013 estris Pierre Soubourou. Ronan Le Corre estis nia kuiristo: li preparis la novjaran festenon por 25 personoj.

Ludonoj 2012

- 17-20 majo : ludono al Interkant' por la dua provludo de Karmen'
- 26-28 majo : ludono al societano por familia festo
- 15-17 junio : ludono al societano por familia festo
- 31 aŭgusto - 2 septembro : EDE luprenis dum 3 tagoj por sia somera universitato
- 8-9 septembro : ludono por familia festo

Bonteno de la bieno

- Maldensigon de la arbaro daŭrigis arbohakisto, interalie en la estonta Verda Vojo. Mastruman planon oni realigis kaj definitivigis en marto 2013 post vizito de teĥnikisto de CRPF (regiona centro pri arbaraj posedaĵoj).
- La subteran kuvon de mazuto anstataŭis nova kuvo situanta en la hejtejo.
- Oni pristudis konstruon de ekstera ŝtuparo ebliganta malaperigi la seslateran internan ŝtuparon inter la unua kaj la dua etaĝo (por konformigi la duan etaĝon al sekurecaj normoj), kaj deponis ĉe la urbestro la devigan permespeton por konstrulaboroj en februaro 2013 (NB la konstruado povos komenci en septembro 2013). Ni verŝajne rajtos malfermi novajn ĉambrojn en la dua etaĝo.

Komunikado

La retejo « gresillon.org » estas nia ĉefa komunikilo, kun nia retmesaĝejo.

La retejo « grandsgites.com » ebligas al ni trovi luprenantojn, niaj programo pri okupado estas atingebla tra tiu ĉi retejo kun la indiko « okupita ». Ni serĉas aliajn komunikilojn ĉar tiu ĉi retejo ebligas al ni ludoni nur semajnfine, kaj ni volus trovi organizantojn de staĝoj, kiuj okupu la kastelon ankaŭ meze de la semajno, ekster la propraj agadoj de la Kulturdomo.

Financa raporto 2012

La jaro 2012 estas malbona jaro: ni antaŭvidis tion, la buĝeto 2012 estis deficitata, pro la fakto, ke tri el la ludonoj en 2011 (infanrenkontiĝo Fringoj, infanferiado REVS, staĝo pri matematiko Animath) ne okazis denove en 2012, kio signifas financon perdon ĉirkaŭ 10 000 €. Ja la vendosumo mem kreskis: ni gastigis pli da staĝanoj, kaj tio kreskigis la rimedojn "servopropono" (malgraŭ la nuligo de la tri supraj ludonoj) kaj "vendo de varoj". Sed la salajroj konsiderinde kreskis, je pli ol 5000 € (ni pagis du kuiristojn), ankaŭ la elspezoj pro nutraĵoj (je pli ol 3000 €). Ni ja vendis dum la jaro 30% pli da manĝoj ol en 2011, sed la ĉefaj elspezoj pro nutraĵoj, kun 5,5% da nereakta imposto, kreskis je 65%. Kelkaj homoj ricevis kompencon en 2011 registritan kiel vojaĝelspezojn, tio klarigas, ke tiuj ĉi malkreskis en 2012, sed kelkajn animantojn ni pagis per honorarioj. Ni pagis honorarion al nia advokato, la du membrokunvenoj kaŭzis sendokostojn, honorarioj pro librotenado altiĝis, same kiel provizado (elektro, akvo...). Fine, ni faris gravajn konstrulaborojn, kreante novan tubaron por malpuraj akvoj kaj kahelante la manĝilejon traŭran de tiu ĉi tubaro: duono de tiuj ĉi laboroj estas kalkulitaj kiel amortizeblaj elspezoj, alia duono kiel elspezoj je prizorgado. Ĉio ĉi kreskigis je pli ol 30% la kostojn 2012 kompare kun 2011, do je pli ol 80% kompare kun 2010. Rezultus el tio deficito je pli ol 15 000 € se ni ne profitus la modifon de nia statuto por ĝisdatigi nian socian kapitalon. Unue, la valoro de socia parto ekde nun estas 16 € kaj ne plu 15,24 €. Due, de multaj jaroj, la forpasintaj societanoj restis enkalkulitaj en la kapitalo: tion ni reordigis en 2012. Ni nun havas 516 societanojn kun entute 1195 sociaj partoj: malaperis, kun entute 1849 sociaj partoj, 576 societanoj forpasintaj aŭ donacintaj sian socian parton, kio malkreskigas la kapitalon de 46 079 € ĝis 20 720 €. Parton de tiu diferenco (15 000 €) ni enkalkulis kiel "esceptajn donacojn", tiel ke formale la deficito de la jaro estas nur 278 €. Alian parton ni registris en ŝuldo-konto, ĉar ni devos repagi sociajn partojn al tiuj el la heredantoj, kiuj

petos de ni. Gravis, ke tiu ĉi ĝisdatigo de la kapitalo ne kaŭzu profiton pri kiu ni devus pagi imposton. Notu, ke la nova statuto antaŭvidas la devigon por societanoj partopreni fizike aŭ perkoresponde en la membrokunvenoj aŭ agadoj de la Kulturdomo minimume unufoje ĉiun trian jaron. Tiuj, kiuj ne plenigas tiun ĉi devigon perdos sian societanecon dum la venontaj jarkunvenoj: al ili ni sendas averton okaze de la nuna kunvokado.

Por 2013, ni kalkulas pri la ludono al ne-Esperantistoj por ankoraŭ kreskigi konsiderinde la vendosumon, sed ĉu tio sufiĉas por rehavi profiton? Ni devos pagi gravajn konstrulaborojn: jam ĉi-jare konstruon de nova ekstera ŝtuparo. Ni do devos rapide alvoki novajn financajn rimedojn, kiel la kreadon de sociaj partoj B (sociaj partoj je 250 € ekzemple, rajtigante je tantiemo kaze de profita spezokonto). Tio ĉi postulas Eksterordinaran Membrokunvenon.

La bilanco, la spezokonto 2012 kaj la buĝeto 2013 estas konsulteblaj en nia retejo. Ni disdonos ilin dum la jarkunveno, kaj ni sendos ilin poŝte al tiuj, kiuj demandas ilin. La agadraporto, la financa raporto kaj la rezolucioj estos voĉdonitaj surloke: do ne okazos ĉi-jare perkonresponda voĉdono.

REZOLUCIOJ

Rezolucio 1 : la Membrokunveno akceptas la kontrakton proponitan de la Komitato al Elizabeth Dubot por legomkultivado sur 1 hektaro de nia bieno kaj transforma agado.

Kadre de la klerigado, kiun ŝi ricevas de agrikultura lernejo, Elizabeth Dubot proponas planon pri legomkultivado sur 1 hektaro de la bieno de Greziljono. Ŝi petas nian konsenton por realigi sian planon.

Rezolucio 2: la Membrokunveno akceptas la principon, ke la Kulturdomo dungu partatempe administranton se, post provperiodo, la merkatesploro realigota de teamo gvidata de Pierre Soubourou konvinke konkludos favore al tio.

La ĉeesto de konstanta prizorganto de la kastelo ebligas kreskigi la nombron de ludonoj, sekve la entutan vendosumon de la societo. Sed la merkatesploro por scii, ĉu tio sufiĉas por pagi novan salajron, restas farenda, sekve ni planu provperiodon, dum kiu Pierre Soubourou ankoraŭ ne ricevos salajron.

Rezolucio 3 : la Membrokunveno principe konsentas, ke la Komitato preparu kontrakton pri konstanta ludono de parto de la bieno por Verda Vojo.

La urbestrejo de Baugé en Anjou deziras inkluzivi en la verdan vojon La Flèche - Baugé la terenon de la antaŭa fervojo parte sur nia bieno. Ĝi ankoraŭ ne redaktis kontrakton, kiun ni povu akcepti dum tiu ĉi Jarkunveno, sed laŭ la lasta kunsido, kiun ĝi organizis pri tiu temo, necesas unue principa konsento antaŭ ol pristudi detale la kontrakton mem.

Rezolucio 4 : la Membrokunveno konsentas, ke ekde la venonta Jarkunveno, la societanoj, kiuj eksplicite konsentis tion, ricevu sian kunvokilon per retmesaĝo kaj ne plu per poŝta sendo.

Por ŝpari sendokostojn kaj konforme al artikolo 13 de nia nova statuto.

.....✂.....✂.....✂.....	
Maison Culturelle de l'Espéranto Kulturdomo de Esperanto Grésillon Saint Martin d'Arcé 49150 Baugé en Anjou France	Mi, subskribinto / Je soussigné
Rajtigilo por la Ĝenerala Kunveno de la 30a de junio 2013	Adreso / Adresse:.....
Pouvoir pour l'Assemblée Générale du 30 juin 2013	Tel :Retadreso/courriel.....
	Rajtigas S-on/S-inon / Donne pouvoir à Mr, Mme
	reprézenti min ĉe la Ordinara Ĝenerala Kunveno de la societanoj okazonta dimanĉon 30an de junio 2013 en Greziljono / de me représenter lors de l'Assemblée Générale du dimanche 30 juin 2013 à Grésillon.

Dato/Date :

Subskribo/Signature :